

Pri PIV, kiu estas 10-jara
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 447, 1981.01.22 & 24

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La studtemo de la kolokvo, kiu en pentekosto malfermos la someran kurssesion de Internacia Feria Altlernejo, estos la **vortfarado kaj la vortaroj**. Por sin pretigi al tiu ĉi kolokvo, la partoprenontoj estas petataj relegi la antaŭparolon de nia ĉefa vortaro: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, kiun la esperantistoj nomas PIV. Ĉar ni perradie spegulos la kolokvajn referaĵojn, ni opinias utile ankaŭ perradie kontribui al la pretiĝo al tiu ĉi kolokvo. La pasintan semajnon, per citaĵoj el la antaŭparolo al PIV, ni instruiĝis pri la redaktiĝo de la antaŭulo de PIV, tio estas la Plena Vortaro de Esperanto, kies iniciatinto estas Eŭgeno Lanti kaj ĉefaj redaktoroj Gaston Waringhien kaj S. Grenkamp-Kornfeld. Hodiaŭ ni intimiĝu kun la ellaboriĝo de PIV, per citaĵoj el ties antaŭparolo.

A.- "Laŭ interkonsento kun Lucien Bannier, kiu prudentoplene anstataŭis la karmemoran Lanti, "Gaston Waringhien" aranĝis 64-paĝan "Suplementon" al la Plena Vortaro, kompilitan inter Februaro kaj Novembro 1953 kaj aperintan en Junio 1954, kun 966 artikoloj."

Cl.- "La redaktado de "la Grand Dictionnaire espéranto-français kaj de la Suplemento al la Plena Vortaro" evidentigis la neblon daŭrigi sola tiel ampleksan laboron: feliĉe por "Gaston Waringhien" kaj por la P.I.V., li tiam trovis en D-ro André Albault la bezonatan specialiston pri medicino kaj en lia duobla kompetenteco, esperantologa kaj fakvortarista, plej valoran helpon; aliflanke R. Haferkorn, kiu jam de dek jaroj okupiĝis pri teknikaj terminaroj kaj ĵus aperigis kun K. Dellian "Sciencan kaj Teknikan Terminaron", konsentis en Oktobro 1956 fariĝi la Direktanto de tiu parto en la PIV; kaj lia elektiĝo, la sekvantan jaron, al la Direktoreco de la Sekcio "Teknika Vortaro" de la Akademio povis nur faciligi lian kompleksan taskon varbi kunlaborantojn por la plej gravaj fakoj, ordigi ties kontribuojn kaj kontroli aŭ harmoniigi ilin."

A.- "Fine, en la komenco de 1960, Haferkorn disponigis al Gaston Waringhien la rezulton de sia laboro, sub formo de ampleksa sliparo, kaj tuj en Aprilo 1960 Gaston Waringhien komencis la redaktadon de la manuskripto de la PIV, kiu daŭris ĝis Marto 1965. La manuskripto kovris 1297 paĝojn en densa tajpado, sed ĝi ankoraŭ ne entenis la nemodifitajn artikolojn de la Plena Vortaro nek la slipojn liveritajn de Haferkorn kaj de aliaj kunlaborantoj."

Cl.- "Kunfandi la tuton en unu solan, koheran manuskripton kaj fari el ĝi kvar ekzemplerojn estis la komplika, atentostreĉa kaj pezega tasko, kiun André Caubel plenumis inter Junio 1960 kaj Februaro 1966, profitigante krome la komunan verkon per siaj sagacaj rimarkigoj."

A.- "La definitiva manuskripto ampleksis 3285 paĝojn en maldensa tajpado, kaj la tuta vortaro entenis ĉirkaŭ 15'250 artikolojn. Sed ĝis la ekspresiĝado kaj eĉ dum la kompostado, Gaston Waringhien ne ĉesis enmeti diversajn kompletigojn aŭ korektojn, kiujn li aparte pruntis el la spertoplenaj proponoj de D-ro Albault... Vortaro estas io sama kiel mastrumado - la tasko neniam estas finita." humure rimarkigis Gaston Waringhien en sia antaŭparolo.

Cl.- "Se tiel granda kaj grava verko sukcesis vidi la lumon, tion oni ŝuldas kaj al la kuraĝa iniciatemo de la Plenum-Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj al la sindediĉo de ĝia Prezidanto Lucien Bannier, kiu nenion ŝparis por trovi la plej taŭgan kaj fidindan presejon,

kaj prenis sur sin ne nur la aranĝon de la tuta eldonplano, sed ankaŭ la financon respondecon de tiu timiga entrepreno - fine al la malavara subtenado de multaj fervoraj esperantistoj, el kiuj kelkaj oferis eĉ el sia propra neceso por certigi la efektivigon de la PIV. Nur dank'al la penoj de tiuj anonimaj, sed aŭtentaj disĉiploj de Zamenhof kaj de Lanti kronigis la kolektiva laboro de tiom da jaroj."

A.- "La idealo de bona vortaro por iu ajn lingvo estas respeguli la lingvon uzatan en unu pli-malpli vasta medio kaj en unu pli-malpli limigita tempo. Tio supozigas la konsideradon de du serioj da faktoj: unue la elementoj, kiuj estas herede trudataj de la tradicio (formo de la vortoj, ilia baza senco, iliaj derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj, la reguloj, laŭ kiuj ili aranĝiĝas en frazojn); due la elementoj, kiuj variadas laŭ la homgrupoj, la epokoj kaj la verkistoj (la dirmanieroj proverabaj aŭ metaforaj, la arkaismoj kaj neologismoj, la stilo ktp)."

Cl.- Gaston Waringhien notas, ke "krome al tiu registrado aldoniĝas ofte, konfesata aŭ ne, ia normiga intenco, ĉar eĉ la sola elektado inter la sennombraj eblaĵoj de la parolo estas per si mem esprimo de juĝo kaj deziro influadi la uzantojn."

A.- "Kiam temas pri lingvo internacia - kaj sennacia - kiel Esperanto, la kondiĉoj estas, kvankam multe pli kompleksaj, esence la samaj. La herede trudatajn elementojn liveras la "Fundamento", kaj la ceterajn elementojn la uzado de la bonaj verkistoj, ĉar, en tia okazo, pro la malofteco de multaj kaj daŭraj renkontiĝoj inter la esperantistoj, la uzadon montras kaj elvolvas precipe la skriba lingvo kaj de la gazetoj kaj de la libroj."

Cl.- "Tiel "la tasko de Gaston Waringhien, preparita kaj apogita sur la verko de Grosjean-Maupin estis duobla: unue prezenti kiel eble plej fidele la donitaĵojn de la "Fundamento", due esplori plej zorge la postan literaturon kaj prezenti pri ĝi plej kompletan bildon."

A.- "Nur el tiu duobla klopodo tia verko, kia estas la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", povas atingi sian esencan celon, registri la akiraĵojn kiel sekuran deirejon al plua elvolviĝado."

C1.- "Ĉar lingvo povas evolui kaj pliriĉiĝadi sen danĝero por sia unueco kaj stabileco nur, se ekzistas, de ĉiuj konata kaj al ĉiuj facile alirebla, firma bazo el klare difinitaj vortoj, komune fiksiĝintaj kunmetaĵoj, rutine uzataj dirmanieroj kaj ĝenerale akceptitaj metaforoj."

A.- "Tial", konkludas Gaston Waringhien "mi penis kolekti plej grandan nombron da ekzemploj tiom el la klasikaj verkoj, kiom el la ĉiutagaj konversacioj, kaj mi donis grandan spacon al la senc-esploro de la plej uzataj radikoj."

Cl.- Povu tiuj ĉi citaĵoj el la antaŭparolo al la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto vin instigi komplete legi tiun ĉi interesan tekston.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond citante el la antaŭparolo al PIV raportis pri la redaktiĝo de tiu monumenta verko kaj pri la celo kaj metodo, kiun Gaston Waringhien sin donis. Gis reaŭdo !